



Estrara Komunikado EKO 2018-24 sendita el Budapeŝto, la 16an de decembro.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

La alfabeto de Esperanto

Precipe por landoj sen siaj propraj edukaj rimedoj. Jen uzbla materialo! Inter la eroj estas filmo, kiu prezentas la alfabeton de Esperanto.

http://www.espero.com.cn/node_7229679.htm

Tio estas prizorgita de la revuo *El Popola Ĉinio*.



Informilo por Interlingvistiko

La novaj eldonoj de Ipl (Informilo por Interlingvistoj, 106) kaj Ifl (ĝia anglalingva eldono: Information for Interlinguists, 06) haveblas rete:

Ipl (Esperante):

Nova numero: https://www.esperantic.org/wp-content/uploads/2018/12/Ipl_106_Final.pdf

Pli fruaj numeroj: <http://www.esperantic.org/eo/publikajoj/ipl/>

Ifl (angle):

Nova numero: https://www.esperantic.org/wp-content/uploads/2018/12/IfI_106_Final.pdf

Pli fruaj numeroj:

<http://www.esperantic.org/en/publications/ifi-information-for-interlinguists/>

Informilo por Interlingvistoj estas publikaĵo de Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ipl kaj ĝia anglalingva eldono (IfI) disponigas informojn kaj ĝisdatigojn en la kampoj de planlingvoj, interlingvistiko kaj lingvoplanado. Ambaŭ eldonoj enhavas detalojn pri eventoj, novaj publikaĵoj, raportojn pri lastatempaj konferencoj, kaj disponigas multajn aliajn informojn por universitatoj kaj ĉiuj, kiuj interesiĝas pri interlingvistiko kaj rilataj kampoj. La limdato por kontribui al la sekva numero estas la 28a de februaro 2019.

Progreso en la Sudazia regiono

Ĝuste nun estas okazanta grava landa kunveno de nia Landa Asocio en Barato (Hinda Unio). Ĝi okazas nun en Puneo, kaj enhavas AMO-seminarion 53. Ni raportos pri la sekvo.

Novaj membroj: kiel aliri kaj elŝuti la revuon

Por 2019 alvenos membroj en la nova kategorio 'baza membro (MB). Homoj en tiu kategorio ricevas la revuojn rete. Sekve, ili praktike devas sendi al la CO en la aliĝilo validan retadreson. Al tiu retadreso venos informo, kiam nova numero de revuo *Esperanto* estas legebla kaj elŝutebla. Jen bildo de tia mesaĝo. Uzu la ligilon ene de sep tagoj kaj vi povos vidi la plejlaste aperintajn numerojn. Elektu ĉu nur legi la revuon en via krozilo, ĉu elŝuti ĝin en la formato PDF. Bonan legadon!

Estimataj abonantoj de la revuo Esperanto,

En la retejo UEA.ORG jam estas elŝutebla la PDF-versio de la januara numero de la revuo Esperanto. Tio estas ALDONA servo por la ricevantoj kaj abonantoj de la UEA-revuoj.



[Premu la ligilon por tuja elŝuto de la PDF-versio](#)

(La ligilo estas persona kaj validas dum 7 tagoj.)

La enhavlisto de la januara kajero:

- 3 ... Novjara mesaĝo de la Prezidanto de UEA: La bezono senti nin kune
- 4 ... Esperanto en universitatoj: Pri la Nitobe-simpozio okazinta en Lisbono, aŭgusto 2018
- 6 ... Instrui interlingvistikon universitate
- 8 ... Intervjuo kun Ilona Koutny
- 11 ... Kion diris Bertrand Russell pri Esperanto al sia studento M.H. Sahebzamani?
- 11 ... Esperanto kaj Unesko-Kuriero prezentitaj dum universitata konferenco
- 12 ... La Zaozhuanga Universitato de Ĉinio, Nia Stelo
- 13 ... Kalejdoskope
- 14 ... Iom pri la ekskursoj dum la 104-a Universala Kongreso
- 15 ... Afriko brilas | Opinio: Solvi la konfliktojn en Afriko. Kiel UEA povas kontribui al tio? Analizoj kaj proponoj
- 16 ... La nuna situacio kaj taktikoj por enkonduki Esperanton en la bazajn lernejojn de Ĉinio
- 19 ... Instruado de Esperanto: Iom pri E-lernolibroj kaj instruado de Esperanto en Uzbekio
- 20 ... Laste Aperis
- 21 ... **Recenzo:** Plia mikspoto
- 22 ... **AMO:** AMO atingas sian kvindekan en malpli ol kvin jaroj
- 23 ... **Eventoj:** Malferma Tago
- 23 ... Forpaso

Por elŝuti tiun ĉi kaj pli fruajn numerojn de UEA-revuoj vi povas viziti retpaĝon <https://uea.org/revuoj/> (unuafajaj vizitantoj bezonas registriĝi).

Poezia konkurso en Francio akceptas poemojn en Esperanto

Baldaŭ komenciĝos la franca konkurso 2019 de "Poésie en liberté" (Poezio tutlibera), duafoje malfermata al poemoj en Esperanto. En 2018, 48 junuloj el la tuta mondo partoprenis la konkurson esperantlingve. La konkurso 2018 finiĝis kun 2 belaj vesperoj en Parizo la 22-an kaj 23-an de novembro. En la foto farita dum la ceremonio de la 22-a de novembro 2018. Maldekstre Eva Pechova ricevas la 3-an premion el manoj de Petr Dulak, Ambasadoro de Ĉeĥio en Francio; dekstre Ingrid Berglund ricevas la 1-an premion el manoj de Didier Loison, vic-prezidanto de Esperanto-France. Pliaj fotoj estas videblaj ĉe: www.poesie-en-liberte.fr). Alkroĉite estas la regularo (esperantlingve) por la konkurso 2019. Bv. helpi diskonigi ĝin.



Vortoj: 470

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikiloj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikiloj-pri-agado>. La prezento nun tute ĝisdata ĝis 2018-14. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.